

Leciono #2 – Mi provis ripari mian aŭton

Ligilo al la filmo: <https://youtu.be/AlSkZ-Pyv-w>

Tasko 1: Aŭskultu la filmon kaj enmetu la mankajn vortojn

Iam mi provis ripari la _____ de mia aŭtomobilo. Bedaŭrinde mi ne sukcesis. Kaj nun mi volas rakonti al vi tion, kio okazis. Mi iam subite aŭdis laŭtan _____. La fenestro de mia aŭto ne plu _____. Mi povis puŝi ĝin suben. La _____ ne plu levis fenestron. Mi nur aŭdis strangan _____ en la pordo. Mi decidis savi monon. Mi tial volis mem _____ la fenestron. Mi neniam antaŭe riparis aŭton. Komence mi forigis la _____ de la pordo. Mi trovis la _____. Mi forigis ilin per mia elektra _____. La kovrilo ankoraŭ estis fiksita. Subite mi vidis pliajn ŝraŭbojn _____. Ankaŭ tiujn mi forigis. Sed la kovrilo ankoraŭ estis _____. Mi tial provis forigi ĝin _____. Mi kaj mia filo forte tiris. Mi uzis tro da forto, kaj tial _____ ĝin iomete. Post kelkaj minutoj la kovrilo estis _____. Mi povis vidi diversajn _____ kaj la motoron. Mi ne povis vidi problemon. Mi, do, komencis forigi la _____, kaj tuj vidis tion, kio okazis. Mi ankaŭ vidis, ke mi ne povas ripari la fenestron. Ekzistis plia kovrilo, kiu estis _____ al la pordo. Tiuj nitoj estis el _____ kaj mi ne havis la ilojn por forigi ilin. Mi do fermis la pordon kaj mi metis la _____ kovrilon en la aŭton. Mia _____ ripari la fenestron tial ne estis sukcesa. Mi sentis min _____. Mi tial decidis almenaŭ ŝanĝi la _____ de la aŭto. Mi komence _____ la ŝraŭbojn, sed ne tro. Poste mi _____ la aŭton por forigi la ŝraŭbojn. Mi malkovris, ke la rado estas _____. Mi pensis, ke tio estas pro _____. Mi tial uzis alian radon kaj _____ ĝin kontraŭ la fiksita rado. La rado falis de la _____. Mi poste povis _____ la alian radon. Mi laboris proksimume tutan horon. Kelkajn semajnojn poste, mi _____ la aŭton al _____. Li riparigis ĝin. Li diris al mi, ke li uzis _____ por forigi la nitojn. Li diris al mi, ke ne estas facile ripari la fenestron. Sed almenaŭ nun ĉio refoje funkcias bone. Ĝis revido!

Tasko 2: Ĉu vera aŭ falsa?

1. Post kiam la fenestro rompiĝis, la fenestro restis firma. (V / F)
2. Aŭdeblis stranga sono en la pordo. (V / F)
3. Mi jam ofte riparigis aŭton, kaj tial mi estis sperta. (V / F)
4. Forigi la kovrilon de la pordo estis facila tasko. (V / F)
5. La metala kovrilo estis ne forigebla. (V / F)

6. La radoj falis de la akso, post kiam mi malstreĉis la ŝraŭbojn. (V /F)
7. La mekanikisto sciis kiel malmunti la metalan kovrilon. (V /F)

Solvo de Tasko #1

Iam mi provis ripari la fenestron de mia aŭtomobilo. Bedaŭrinde mi ne sukcesis. Kaj nun mi volas rakonti al vi tion, kio okazis. Mi iam subite aŭdis laŭtan krakon. La fenestro de mia aŭto ne plu funkciis. Mi povis puŝi ĝin suben. La ŝaltilo ne plu levis fenestron. Mi nur aŭdis strangan sonon en la prodo. Mi decidis savi monon. Mi tial volis mem ripari la fenestron. Mi neniam antaŭe riparis aŭton. Komence mi forigis la kovrilon de la pordo. Mi trovis la ŝraŭbojn. Mi forigis ilin per mia elektra ŝraŭbilo. La kovrilo ankoraŭ estis fiksita. Subite mi vidis pliajn ŝraŭbojn sube. Ankaŭ tiujn mi forigis. Sed la kovrilo ankoraŭ estis firma. Mi tial provis forigi ĝin perforte. Mi kaj mia filo forte tiris. Mi uzis tro da forto, kaj tial rompis ĝin iomete. Post kelkaj minutoj la kovrilo estis malmuntita. Mi povis vidi diversajn kablojn kaj la motoron. Mi ne povis vidi problemon. Mi, do, komencis forigi la motoron, kaj tuj vidis tion, kio okazis. Mi ankaŭ vidis, ke mi ne povas ripari la fenestron. Ekzistis plia kovrilo, kiu estis nitita al la pordo. Tiuj nitoj estis el metalo kaj mi ne havis la ilojn por forigi ilin. Mi do fermis la pordon kaj mi metis la platan kovrilon en la aŭton. Mia provo ripari la fenestron tial ne estis sukcesa. Mi sentis min seniluziigita. Mi tial decidis almenaŭ ŝanĝi la radojn de la aŭto. Mi komence malstreĉis la ŝraŭbojn, sed ne tro. Poste mi levis la aŭton por forigi la ŝraŭbojn. Mi malkovris, ke la rado estas algluita. Mi pensis, ke tio estas pro rusto. Mi tial uzis alian radon kaj batis ĝin kontraŭ la fiksita rado. La rado falis de la akso. Mi poste povis munti la alian radon. Mi laboris proksimume tutan horon. Kelkajn semajnojn poste, mi transdonis la aŭton al mekanikisto. Li riparigis ĝin. Li diris al mi, ke li uzis drilon por forigi la nitojn. Li diris al mi, ke ne estas facile ripari la fenestron. Sed almenaŭ nun ĉio refoje funkcias bone. Ĝis revido!

Solvo de Tasko #2

1. F
2. V
3. F
4. F
5. V
6. F
7. V

Ligiloj

Ligilo al la jutuba kanalo: https://www.youtube.com/channel/UCLgkMgy1i9QaOzC_PM9AoRg

Vi povas mendi facile legeblajn librojn ĉi tie: <http://www.verdaolivo.com>

Ligilo al aliaj lecionoj: <http://www.verdaolivo.com/kursoj>